# BELGA ESPERANTISTO

45a Jaro - N-ro 4a - Oktobro 1953

DUMONATA REVUO, OFICIALA ORGANO
DE
REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA
Asocio sen profita celo,
aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Socia Sidejo : 106, rue Général Lotz, Bruselo



Ĉefredaktoro :
Maur. JAUMOTTE
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno


# Por la 39a Univerala Kongreso en HAARLEM



La « Concertgebouw » (Granda Koncertejo) en Amsterdam, en kiu okazos, en 1954, la solena malferma kunsido de la 39a Universala Kongreso, kies aliaj aranĝoj disvolviĝos en la apuda urbo HAARLEM.

# REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

106, rue Général Lotz, Bruselo

— ASOCIO SEN PROFITA CELO —

Statutoj : *Moniteur Belge - Belgisch Staatsblad*, n-ro 115, 27 Junio 1936.

## HONORA KOMITATO

S-ro Frans VAN CAUWELAERT,
Prezidanto de la Deputitaro.

S-ro J. VAN HOUTTE,
Ĉefministro, Deputito.

S-ro Achille VAN ACKER,
Eksĉefministro, Deputito.

S-ro Robert CATTEAU,
Vic-Prezidanto de la Senato, Skabeno de Bruselo.

S-ro Lode CRAEYBECKX,
Urbestro de Antverpeno, eksministro, Deputito.

S-ro Georges MAZEREEL,
Senatano.

S-ro Georges MICHELET,
Honora Direktoro de la Komerca Ĉambro de Bruselo.


# BELGA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

45a Jaro | Oktobro 1953 | N-ro 4a (*)


# ĈIAM ANTAŬEN NI IRU !

Kiam tiu ĉi numero estos antaŭ la okuloj de la legontoj, ĉie en la lando la kursoj, organizitaj de la Grupoj, estos rekomenciĝintaj.

Denove ni staros antaŭ jaro de propaganda laboro; ĉar se la kotiza jaro komenciĝas okaze de la renoviĝo de la jaro, la laboro de la Ligo kaj de la grupoj tamen ne dispartiĝas laŭ la kalendara jaro.

Kaj la plej grava momento en la vivo de la grupoj estas tiu, kiam reorganiziĝas la kursoj. Ĉar de la sukceso de tiuj kursoj efektive dependos la sukceso de la grupa vivo.

Oni, en tiu ĉi tempo, multe parolas pri transdono de sango; de tiu sango, kiu renoviĝos la funkciadon de la organismo, de la homa korpo. Nu, la alveniĝo de novaj lernantoj al niaj kursoj estas kvazaŭ transdono de sango.

En la plej bone funkcianta grupo, — en kaj ekster la Esperanta movado, — iom post iom, malnovaj membroj forfalas, ne nur pro malsano kaj morto; sed ankaŭ pro malpliiĝo de la intereso por aferoj, kiuj ne rekte rilatas al la profesio, al la mongajno, al la ĉiutaga vivo.

Kaj tiuj membroj, inter kiuj iuj estis bonegaj helpantoj, kiuj ne nur regule ĉeestis la kunsidojn, sed kiuj kunefektivigis la ĉiutagan laboron, devas esti anstataŭataj.

En Esperantujo, ili malfeliĉe ne povas esti anstataŭataj de kiu ajn novulo, kiun oni hazarde renkontas kaj kiun oni momente entuziasmigas.

En nia mondo, la neofito devas ja eklerni unue la lingvon; ĉar por la plej multaj el la transdonotaj taskoj la kono de la lingvo estas necesa.

Kaj tiu tempo, dum kiu la neofito lernos la lingvon, ofte sufiĉos por forfaligi tute aŭ preskaŭ lian emon al granda laboro, al grandaj reformoj kaj plibonigoj en la funkciado de la grupo !

Tial ni bezonas, ĉiam kaj ĉiam, pli da lernantoj. Kaj do ankaŭ pli da sangdonantoj, da propagandistoj, kiuj alkondukos al niaj kursoj tiujn sanghavantojn, kiuj eble, siavice, iĝos iam sang-donantoj !

Tial ni volas honore saluti en tiu ĉi aŭtuna numero tiujn, kiuj povas diri, legante tiujn ĉi liniojn :

Mi sendis al la kurso, organizita de mia grupo, unu, du, tri, kvin, ok lernontojn... Mi faris mian devon... Mi donis mian sangon.

Sed kiel la Ruĝa Kruco daŭre alvokas al plia donado, ni ankaŭ alvokas vin... Ne ripozu... Varbadu... Kaj ĉiam antaŭen ni iru !

Maur. JAUMOTTE.

(*) La antaŭa eldono de B.E. (Aprilo) portis la numeron 2. La 3-a numero de ĉi tiu jaro estis anstataŭata de la speciala eldono « Beneluksa Esperantisto ».

# LA 38a UNIVERSALA KONGRESO EN ZAGREB

Ni ne intencas doni tie ĉi raporton detalan pri la Universala Kongreso, kiu okazis tiun ĉi someron en Zagreb.

La legantoj, kiuj vere interesiĝas pri tiuj ĉi detaloj, povis ilin jam trovi en la revuo de U.E.A., en « Heroldo », k.t.p.

Ni substreku ke, okaze de la malferma kunsido de tiu ĉi Kongreso, por kiu enskribiĝis 1760 esperantistoj el 30 landoj, parolis esperante la urbestro de Zagreb, S-ro Večeslav Holjevac, kiu per konvinkaj vortoj montris sian komprenon pri la celo de nia lingvo kaj, — je ĉies granda surprizo — ankaŭ la Honora Protektanto de la Kongreso, la Prezidanto de la Kroata Registaro, D-ro Vladimiri Bakarič, kiu substrekis ke, jam dum pluraj jaroj, la oficialaj instancoj en Jugoslavujo sekvas kun granda intereso la laboron de la Esperantistoj kaj kiu salutis la Kongreson, al kiu li deziris plenan kaj brilan sukceson.

Oni komprenos ke post tiuj du esperantlingvaj paroladoj, sekvis longa, ripetita aplaŭdo.

Laŭ oratora vidpunkto, estis certe granda allogaĵo la fakto, ke ĉeestis D-ro Edmond Privat, kiun la malnovaj esperantistoj en nia lando ankoraŭ memoros pro liaj belaj paroladoj en Mons, okaze de Belga Kongreso, kaj en Antverpeno, okaze de la XXa Universala Kongreso.

S-ro Malmgren memorigis pri li, ke dum la unua kaj jam legendara kongreso en Bulonjo-sur-Maro aperis junulo, kies variaj kapabloj kaj talentoj devis poste grave influi nian movadon. Tiu ĉi junulo tiama nun festas sian 50-jaran jubileon en la movado kaj nun ankoraŭ ĉiam estas la oratoro Nro. 1 en Esperantujo.

La Kongreso donis okazon por inaŭguro de Zamenhofstrato : « *Ulica Dr. L.L. Zamenhofa* ». La urba aŭtoritato elektis unu el la plej belaj kaj larĝaj stratoj, en vilaokvartalo. Estis la urbestro mem de Zagreb, kiu inaŭguris la straton en ĉeesto de miloj da esperantistoj kaj de interesuloj.

Citindaĵo estas, ke UNESKO estis delegaciinta ĉe tiu ĉi Kongreso, observanton, S-ron Pierre Lebar, kiu ne konas Esperanton; kiu do salutis la Kongreson franclingve, sed kiu ĉeestis la plej gravajn kunsidojn kaj kiu baldaŭ povis kompreni la esprimitajn ideojn kaj konvinkiĝi pri la granda facileco de la lingvo kaj de ĝia uzebleco.

Ni ne dubas ke lia raporto al UNESKO, eble ne tuj, sed tamen certe influos la sintenon de tiu organismo.

Ni diru, por fini, ke ĉe tiu ĉi Universala Kongreso estis Somera Universitato, en kiu diversaj profesoroj el diversaj landoj faris interesajn prelegojn, kaj ke, nome de la belga registaro kaj de Belga Ligo, salutis la Kongreson S-ro J. Hérion, el Verviers.

## ... KAJ LA 39a

*Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando*
*31a de julio ĝis 7a de aŭgusto 1954.*

*Kotizoj* : Kongresanoj : 10 guldenoj; Edzino de kongresano : 9.50; Junulo ne pli ol 20-jara : 6.50.

La kongresanoj, individuaj membroj de U.E.A. pagos malplie 2.50 guldenojn.

*Pagmaniero* : Kiuj pagas per banko bonvolu noti, ke la nederlandaj bankoj deprenas por maklero f.0.50 de pagoj el la eksterlando. Tiun sumon aldonu al la sumo pagebla al nia konto. Prefere pagu tro multe ol tro malmulte ĉar ekstraĵon ni skribas je la kredito de la kongresano. Konsilinde estas, ke pluraj personoj pagu kune por eviti unuopajn maklerojn. Cetere, per Internacia Poŝtmandato oni evitas tiujn ĝenojn.

Notu tre bone, ke Perantoj de la kongreso (kun eventuala escepto de karavangvidantoj) akceptas nur kotizojn.

Sendante pagon sempere al Haarlem, nepre



POST BELA KONGRESO

# KUNLABORO

La Beneluksa Kongreso en Antverpeno estis sukceso.

Ne nur sukceso laŭ la nombro de partoprenintoj, sed ankaŭ laŭ la atmosfero, kiu regis dum la tri kongresaj tagoj.

Tio instigis la tri Ligojn daŭrigi sian kunlaboron, kaj malgraŭ la fakto ke la proksima Universala Kongreso okazos en Haarlem kaj ke la Nederlanda Asocio L.E.E.N. do preferas nè organizi veran nacian Kongreson, ili akordiĝis pri la organizo de plia Beneluksa Kongreso, dum la proksimaj pentekostaj tagoj, en Lieĝo.

La laborantaj membroj de la L.K.K. estos ĉefe membroj de Belga Ligo, sed ambaŭ Flandra Ligo Esperantista kaj L.E.E.N. estos reprezentataj en la organiza Komitato.

Aliflanke, la estraroj de R.B.L.E. kaj de Flandra Ligo Esperantista baldaŭ komune kunvenos, por ekzameni la diversajn eblecojn rilate al pli intima kunlaboro.

Por montri al ĉiuj membroj de ambaŭ Ligoj, ke la kunlaboremo estas kompleta, la estraroj de la du Ligoj decidis ke simbole la Prezidanto, D-ro P. Kempeneers, la vicprezidanto S-ro Maur. Jaumotte kaj la Ĝenerala Sekretario S-ro Henri Sielens iĝos membroj de Flandra Ligo, dum tri membroj de la estraro de Flandra Ligo ankaŭ iĝos membroj de Belga Ligo.

Tiu gesto montros la vojon, kiun la gvidantoj de la movado en nia Lando deziras aliri por la plej granda bono de ambaŭ Ligoj kaj de la movado en nia Lando.

Intertempe do la esperantistoj de la Lieĝa regiono jam kunvenis kaj okupiĝas nun pri la kunmeto de definitiva L.K.K., kiu tuj eklaboros.

Kiel montriĝas per la Honora Kolono, kiun ni publikigas en tiu ĉi numero de nia Bulteno, jam multaj membroj de Belga Ligo montris sian apogemon al la organizontoj kaj same faris ankaŭ membroj de Flandra Ligo, tiel ke, de nun, la sukceso de tiu Beneluksa Kongreso 1954 estas certigata.

Ni aliflanke atentigas pri la fakto ke, en Haarlem, kunmetiĝis, — sub la prezidanteco de S-ro Mabesoone, la vicprezidinto de la Antverpena L.K.K. — la Loka Kongresa Komitato de la 39a Universala Kongreso, por kiu oni jam nun povas enskribiĝi.

Nedubeble pluraj belgaj esperantistoj, kiuj ordinare ne ĉeestas la Universalajn Kongresojn, deziros vojaĝi al Haarlem en 1954a kaj rerenkonti, kun multaj aliaj, la nederlandajn samideanojn, kun kiuj ili interkonatiĝis dum la pentekostaj tagoj de 1953a en Antverpeno.

---

samtempe sendu la Aliĝilon. Sendante pagon per Peranto, ankaŭ al li sendu la Aliĝilon.

*Korespondado* : Post aliĝo, direktu ĉiujn petojn pri informo senpere al la L.K.K. por ŝpari tempon. Aldono de Internacia Respondkupono (aĉetebla en vialanda poŝtejo) helpos. La oficiala lingvo de la kongreso estas ESPERANTO. En leteroj uzu nur tiun lingvon. Ĉiam citu vian kongresan numeron en korespondaĵoj. La tuta sistemo de administrado estas bazita sur la numeroj.

*Nombrolimigo* : Pro la limigita entenehlo de salonoj kaj pro la malfacilo loĝigi kongresanojn meze en la turisma sezono la L.K.K. avertas, ke ĝi verŝajn devos limigi la partoprenon en la kongreso. Frua aliĝo sekve estas konsilinda.

*Tempolimo* : Kiel en antaŭaj kongresoj, kaj konforme al la Kongresa Regularo, la L.K.K. anoncas, ke la lasta dato por aliĝo al la kongreso estas la 30-a de junio 1954. Aliĝojn post tiu dato ĝi malakceptos.

# Reĝa Belga Ligo Esperantista, a. s. p. c.

## JARRAPORTO DE LA ADMINISTRANTARO

*Tiu ĉi raporto, same kiel la unuaj partoj de la grupaj raportoj ne povis esti enŝovataj en la antaŭa numero, kiu estis speciala « Beneluksa Esperantisto ».*

*Ili tamen estas sufiĉe interesaj por ke ni ilin presigu, eĉ nun.*

Karaj Gesamideanoj.

Laŭ nia regularo, estas hodiaŭ mia devo raporti al vi pri la agado de nia Ligo dum la pasinta jaro.

En penso, do, mi petas, ni revenu kune al la unuaj tagoj, kiuj sekvis nian jarkunsidon de aprilo 1952. Je tiu epoko, la konsisto de nia estraro estis la jena : Prezidanto, D-ro P. Kempeneers vic-prezidanto, S-ro Maurice Jaumotte; ĝenerala sekretario, S-ro Henri Sielens; kasistino, S-ino Julia Plyson; sekretario, S-ro J. Soyeur. La aliaj administrantoj estis : S-roj Charles Poupeye kaj Georges Groothaert, el Bruĝo; S-ro Clotaire Vandevelde, el Gento; S-roj Georges Van den Bossche kaj Jules Verstraeten, el Antverpeno; S-ro Raymond Paulus, el Charleroi kaj S-ro Jacques Verdier, el Bruselo.

Tiuj administrantoj ankoraŭ funkciadas, escepte tamen S-ron Verdier kiu, pro manko de tempo, ne povis daŭrigi sian oficon. Li estas anstataŭigita de S-ro Michel Pilloy, el Ottignies, kiu prenis sur sin la taskon de la Gazetara Servo de la Ligo kaj ankaŭ okupiĝas pri la Junulara Sekcio.

Dum la jaro, la administrantaro kunvenis sesfoje: ĝi ekzamenis kaj solvis multajn demandojn rilate nian movadon en- kaj eksterlandan. Ĝi konstatis kun ĝojo, ke la plialtigo de la kotizo, anoncita dum 1951, ne malhelpis la kreskiĝon de nia membraro. Efektive, la nombro de niaj liganoj je la fino de la jaro 1952-a superas tiun atingitan je la sama dato de 1951.

Tiu bela rezulto estas precipe ŝuldata al la grupoj de Bruselo kaj Antverpeno, kiuj tre bone klopodis por pligrandigi la nombron de siaj membroj. En la intergrupa konkurso starigita por la disdono de la premio Antoinette Jennen, la Brusela Grupo venas sur la unua lini, kun plialtiĝo de 16,7 %. kompare al la situacio de la antaŭa jaro. Al ĝi estos do atribuata la premio por la jaro 1952. Ni tutkore gratulas ĝin kaj ni estas konvinkitaj ke ĝi faros novan paŝon antaŭen por akiri denove la saman rekompencon por 1953. Siaflanke la aliaj grupoj interbataladus pace por plibonigi sian procenton kaj provi ekkapti siavice la unuan lokon de la listo.

Nia bulteno, « Belga Esperantisto », aperas regule, sed pro la altaj kostoj de ĝia presado, ni bedaŭrinde ne povas doni al ĝi la amplekson, kiun ni dezirus. Nia revuo donas al ni klaran bildon de la vivo esperantista en Belgujo kaj per ĝi ni ekkonas la viglajn klopodojn faratajn de ĉiuj niaj grupoj por ĉiam pli kaj pli agrabligi siajn kunvenojn. En ĝi ankaŭ ni trovas regule la interesajn artikolojn de S-ro Sielens, « Paŝo post paŝo en Esperanto », kiuj refreŝigas al nia memoro la nociojn lernitajn en la kursoj.

Ni havis la plezuron legi en « SVISA ESPERANTISTO », ke nia revuo estas la UNUA esperanta gazeto, kiu anoncis la gravan decidon alprenitan de UNESKO, koncerne la Internacian Petskribon favore al Esperanto. Kaj la svisa revuo aldonis : « Belga Esperantisto » meritus en tiu punkto olimpian laŭron pro ĝia rapideco ». Tiun laŭdon oni ŝuldas al nia Prezidanto, D-ro Kempeneers, kiu transdonis la novaĵon al la ĉefredaktoro de la bulteno, tuj kiam li ekkonis ĝin kaj ankaŭ al S-ro Jaumotte, kiu sukcesis, je lasthora presmomento, enmeti en la gazeton la laŭditan artikolon. Ambaŭ ricevu nian sinceran gratulon !

La aldonoj « L'ESSOR » kaj « DE ESPERANTIST » tre bone taŭgas por la propagando. Tial la administrantaro decidis daŭrigi ilian sendon al la abonantoj de nia revuo.

Nia jara kongreso okazis en Bruĝo dum Pentekosto 1952: ĝi havis brilan sukceson kaj disvolviĝis tre akurate laŭ programo zorge starigita. La nokta boata vizito al la lumigitaj kajoj de la Norda Venecio kaj la



aŭtobusa veturado laŭlonge de la marbordo restos longtempe en nia memoro. La organizinta komitato meritas la varmajn laŭdojn, kiuj al ili estis malavare adresitaj.

Dum tiu bruĝa kongreso, ni havis la grandan ĝojon festi la unuan oran jubileon en nia nacia movado. Efektive, antaŭ 50 jaroj, bruĝa pioniro, S-ro Witteryck, kuraĝis pensi pri la starigo de esperantista grupo. La unua en Belgujo. Li plene sukcesis kaj de tiam lia grupo elteni, malgraŭ la multaj atakoj kaj malagrablaĵoj al ĝi direktitaj. Ĝi estis la kerno de la estonta Reĝa Belga Ligo Esperantista, kiu ekkonstruiĝis en la jaro 1905.

Ĉi tiun jaron, nia nacia kongreso devus, laŭ la kutimo, okazi en valona urbo. Sed, esperante plifortigi la kontakton inter la samideanoj de la beneluksaj landoj kaj dezirante forigi la eblecon havi 2 esperantajn kongresojn okazantajn je la sama tago en du diferencaj belgaj urboj, la administrantaro interkonsentis kun la gvidantoj de la Flandra kaj de la Nederlanda Ligoj por organizi unikan kongreson, komunan je la tri organismoj.

Por ke tiu komuna kongreso sukcesu, la tri ligoj opiniis ke la urbo Antverpeno, pro sia geografia situacio, taŭgas pli ol alia por la efektivigo de tiu rendevuo. La tri asocioj interesataj en la organizado havos siajn apartajn kongreslaborojn; sed estos komunaj la malfermo kaj ferma kunsidoj, la akcepto en la urbdomo kaj la festeno. Ĉiu Ligo havas membrojn en la Loka Kongresa Komitato kaj rikoltos la enskribon kaj la pagon de sia propra membraro. De nun ni estas certaj pri la sukceso de tiu internacia renkontiĝo, ĉar jam je la komenco de januaro, pli ol 100 kongresontoj aliĝis.

Dum la laborkunsido de nia Ligo, same kiel dum la antaŭaj jaroj, ni organizos oratoran konkurson inter la gejunularo. La pasintan jaron, ni havis bedaŭrinde nur unu kandidatinon, F-inon Henny De Ketelaere, kiu kompreneble gajnis la premion. Cetere, ŝia teksto estis vigle kunmetita kaj bone prezentita. Ni esperas ke, ĉi tiun jaron, ni havos plurajn oratorojn, tiamaniere ke la juĝantaro povu pridiskuti la meritojn de la konkurintoj. La temo proponita estas tiu, kiun oni elektis por la Universala Kongreso de Zagreb : « La rolo de Esperanto por la internacia proksimigo de la junularo ». Ĉiuj gejunuloj sin preparu !

Pri la Universala Kongreso de Oslo, okazinta dum aŭgusto 1952, vi povis legi en la oktobra numero de « Belga Esperantisto », la tre bonan resumon redaktitan de nia kasistino, S-ino Plyson, kaj ankaŭ raporton de F-ino Obozinski, pri la kunvenoj, kiujn ŝi ĉeestis.

La 38-a universala kongreso okazos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1953, en Zagreb (Jugoslavujo). Je la fino de januaro, pli ol 700 kongresontoj, el 25 landoj, estis enskribitaj. Sen ia dubo, tiu kongreso estos inda je la antaŭaj.

Mi deziras diri kelkajn vortojn pri la Gazetara Servo de la Ligo, tre bone zorgita de S-ro Pilloy. Dum la jaro 1952, Reĝa Belga Ligo Esperantista sendis 25 artikolojn al 70 gazetoj, inter kiuj 41 franclingvaj, 23 flandraj kaj 6 luksemburgaj. Entute aperis, laŭ nia scio, 65 artikoloj en 15 gazetoj, 8 franclingvaj kaj sep flandraj. Kompare kun la rezultoj akiritaj de aliaj landaj asocioj, tiuj ciferoj estas kontentigaj.

Mi devas ankaŭ atentigi vin pri la « koordinataj kursoj de Esperanto », organizataj en kiel eble plej multaj landoj, sekve de svisa propono. En diversaj lokoj, samtempe, la gelernantoj, kiuj ĉefe estas plenkreskuloj de popolaj universitatoj, ricevas lecionojn laŭ speciala plano, sama por ĉiuj. Tiumaniere, post kelkaj semajnoj, la gelernantoj povas komenci korespondadon. En Belgujo, la elementa kurso estas gvidata de F-ino Obozinski, membrino de Esp. Brusela Grupo; ĝi okazas en la Ateneo Robert Catteau, sub patronado de la urbaj instancoj. Samaj kursoj ekzistas en Firenzo, Helsinki, Karlstad (Svedujo), Kopenhago, Manchester, Parma, Parizo, Salzburg, Stuttgart kaj Zurich. La interkorespondado jam komenciĝis kaj ŝajnas interesi la gelernantojn, kiuj sekvas regule la semajnan kurson. Ni sekvos kun atento la evoluon de tiu provo.

Alia fakto interesa estas : la Literatura Konkurso organizita de la Loka Kongresa Komitato de nia Beneluksa Kongreso, kiu

# NIA HONORA KOLONO 1953

Jam 53 fideluloj pagis sion kotizon por la kongreso en Lieĝo :

1. S-ro Desonay (Spa); 2. S-ro J. Soyeur (Seraing); 3. S-ino J. Plyson (St-Gilles-Bruselo); 4. S-ro M. Jaumotte (Wilrijk-Antverpeno); 5. S-ro H. Sielens (Antverpeno); 6. S-ro J. Verstraeten (Hoboken-Antverpeno); 7. D-ro P. Kempeneers (Uccle-Bruselo); 8. S-ro Ch. Poupeye (Bruĝo); 9. S-ro G. Groothaert (Bruĝo); 10. F.-ino S. Obozinski (Uklo-Bruselo); 11. S-ino H. Schools (Antverpeno); 12. S-ro Ch. Aalders (Grobbendonk); 13. S-ro R. Balleux (Deurne); 14. S-ino R. Balleux (Deurne); 15. S-ino L. Bernaerts (Antverpeno); 16. F-ino H. Brack (Wilrijk); 17. S-ro H. Castel (Ganshoren); 18. S-ino H. Castel (Ganshoren); 19. S-ino G. Debacker (Antverpeno); 20. S-ino J. De Hondt (Antverpeno); 21. S-ro M. De Ketelaere (Antverpeno); 22. S-ro R. De Kegel (Charleroi); 23. F-ino E. De Winter (Antverpeno); 24. S-ino Ernst (Bruselo); 25. S-ro A. Faes (Antverpeno) 26. S-ino L. Faes (Antverpeno); 27. S-ino G. Groothaert (Bruĝo); 28. F-ino H. Hofkens (Antverpeno); 29. F-ino M. Hofkens (Antverpeno); 30. S-ino M. Jaumotte (Wilrijk); 31. S-ro R. Jaumotte (Wilrijk); 32. F-ino M. Jacobs (Borgerhout); 33. S-ino P. Kempeneers (Uccle); 34. F-ino M. Kestens (Bruselo); 35. S-ino R. Lecat (Antverpeno); 36. S-ino Ch. Poupeye (Bruĝo); 37. S-ro C. Poupeye (Bruĝo); 38. F-ino Y. Poupeye (Bruĝo); 39. S-ro M. Poupeye (Bruĝo); 40. S-ino E. Lefebvre (Ixelles); 41. S-ino L. Merckx (Borgerhout); 42. F-ino F. Meulemans (Wilrijk); 43. S-ino Ph. Mortelmans (Deurne); 44. F-ino C. Peeters (Antverpeno); 45. S-ino E. Staes (Koekelberg); 46. S-ino F. Staes (Koekelberg); 47. F.-ino H. Toussaint (Antverpeno); 48. S-ro G. Van den Bossche (Antverpeno); 49. F-ino E. Van der Weken (Antverpeno); 50. F.-ino I. Van Parijs (Bruĝo); 51. F-ino Y. Van Parijs (Bruĝo); 52. S-ro A. Verhoeven (Antverpeno); 53. S-ro G. Vermandere (Antverpeno).

---

aljuĝos por tio, premiojn ĝis 1.500 belgaj frankoj, donacotajn de la tri Ligoj. La interesatoj trovos en la februara numero de Belga Esperantisto la ĝeneralajn kondiĉojn plenumotajn de ili. Nur la membroj de la tri ligoj aŭ la abonantoj de ilia revuo rajtas partopreni en tiu konkurso. La plej lasta dato por la ricevo de la manuskriptoj estas la 30-a de aprilo. La malfruiĝintoj rapidu sendi sia(j)n verko(j)n.

Kvankam tio ne koncernas rekte nian belgan movadon, mi deziras rapide rememorigi al vi la grandan laboron plenumatan de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, kaj speciale de ĝia ĉefo, Prof. Lapenna. Dum la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, okazinta de la 12-a de novembro ĝis la 10-a de decembro 1952, li estis en Parizo kaj parolis kun multaj Unesko-delegitoj. En la nomo de U.E.A., li faris, en UNESKO, franclingvan paroladon. Laŭ instigo de D-ro Privat, la svisa Delegacio decidis proponi la rezolucion, kiun vi ĉiuj konas, rezolucion, kiu estis poste akceptata ĉiuvoĉe de la ĝenerala kunveno.

Por la preparado de tiu agado, multe laboris dum pluraj jaroj, nia brita samideano, S-ro Durrant.

Tiu akcepto de Unesko estas por ni grava sukceso, kiu obligas al ni esperi ke ni alproksimiĝas al la venko. Sed nun, pli ol iam, ni devos labori por doni al la Unesko-Komisionoj kaj al la registaroj la necesajn informojn pri la progresoj de la Esperanto-Movado.

Karaj gesamideanoj, mi alvenas al la fino de mia raporto. Tamen, mi ne volas sidiĝi antaŭ ol atentigi vin pri la sindonemo al nia Ligo : de nia Prezidanto, D-ro Kempeneers, de nia vic-prezidanto, S-ro Jaumotte, de nia ĝenerala sekretario, S-ro Sielens, kaj fine de S-ino Plyson, nia kasistino, kiu tiel zorgeme administras la Ligan kason. Mi proponas al vi aklami ilin kaj ankaŭ la aliajn administrantojn kiuj, en la ombro, laboradas kune, por la pli granda bono de Reĝa Belga Ligo Esperantista.

La sekretario,
J. SOYEUR.



# Paŝo post Paŝo en Esperanto 9.

*En la antaŭa « Paŝo » (no 2 Aprilo 1953a) ni ŝovis tekston « Pri la Historio de Esperanto » el la lernolibro de D-ro Edmond Privat « Kursa Lernolibro ».*

*Tiun ĉi fojon, ni klarigos kelkajn malfacilaĵojn gramatikajn, rilate al tiu teksto.*

*Naskiĝinte en 1859.* Ni konas la finajojn de la participoj en Esperanto: -anta, -inta kaj -onta; -ata, -ita kaj -ota.

La ĉiama logika reguleco de nia lingvo ankaŭ ĉi tie permesas ke el tiuj -a-vortoj oni konstruu substantivojn aŭ adverbojn laŭvole, nur ŝanĝante la -a en -o aŭ -e. (Ankaŭ en naciaj lingvoj ekzistas substantivaj kaj adverbaj participoj.)

Koncerne la substantivan formon, ne ekzistas malfacilaĵo :

Aliĝ*into* : persono kiu estas aliĝ*inta*.

Preterpas*antoj* : personoj kiuj estas preterpas*antaj*.

Atak*oto* : persono kiu estas atak*ota*.

La adverbaj participoj, finiĝantaj en -ante, -inte, -onte, sufiĉe ofte estas uzataj ne-ekzakte.

Oni devas uzi :

*-ante* : kiam la ago de la subfrazo kaj tiu de la ĉeffrazo okazas sampempe. Ekz. : Dum li promenas, li pensas pri la Esperanto-Grupo : Promen*ante*, li pensas pri la Esperanto-Grupo.

*-inte* : kiam la ago de la subfrazo okazas antaŭ tiu de la ĉeffrazo (do tiu de la ĉeffrazo post tiu de la subfrazo).
Ekz. : Post kiam li revenis, li eklernis sian lecionon : Reven*inte*, li eklernis sian lecionon.

*-onte* : kiam la ago de la subfrazo okazas post tiu de la ĉeffrazo (do tiu de la ĉeffrazo antaŭ tiu de la subfrazo).
Ekz. : Antaŭ ol lerni sian lecionon, li prenis siajn esperanto-librojn : Lern*onte* sian lecionon, li prenis siajn esperanto-librojn.

*Ni do ĉiam rememoru, ke*

-ante : dum
-inte : post kiam
-onte : antaŭ ol.

Se D-ro Privat do skribas : Naskiĝinte en 1859... Zamenhof komencis..., tio signifas : Post kiam Zamenhof naskiĝis en 1859, li komencis...

*Kiuj per sia proza aŭ poezia verkado...*

La logika kaj kompleta frazo estas : Granda nombro da ĉiulandaj adeptoj per sia proza aŭ poezia verkado iom post iom pliriĉigis la lingvon. Ni povus turni tiun frazon jenmaniere : Granda nombro da ĉiulandaj adeptoj iom post iom pliriĉigis la lingvon, per sia proza aŭ poezia verkado. Ĉiuokaze temas pri la verkado de la adeptoj : la verkado rilatas al la subjekto de la frazo kaj ne estas parto de la gramatika subjekto : do : *sia* kaj ne ilia.

*Ĉu io ŝajnas neklarigebla al vi ?*

Ni petis ke vi legu kaj relegu la tekston de D-ro Privat kaj ke vi mem pristudu la lingvajn malfacilajojn.

Ni nun uzis tiun tekston por klarigi la uzon de la adverbaj participoj kaj ankoraŭ insisti pri la uzo de « sia ». Se vi trovis aliajn malfacilajojn en la teksto, skribu al « Belga Esperantisto » kaj ni klarigos en nia proksima leciono.

H. S.

# BELGA KRONIKO

## ANTVERPENO

### Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »

*Poŝtĉeknumero : 726.54.*

La 17an de aprilo, la junuloj organizis kabaredan vesperon, kiu iĝis vera sukceso dank' al la kunlaboro de F-inoj Ameryckx J. kaj. M., kaj Vinck L., de S-roj Van Gompel Ch., Van Nereaux W., Vinck J. kaj Vingerhoets W.

La 24an : Tre agrable kaj entuziasme S-ino L. Bernaerts rakontis kaj raportis pri sia vojaĝo al Hispanujo kaj sia bonega akcepto fare de la hispanaj samideanoj.

La 8an de majo ni havis la parolatan ĵurnalon kaj la 15an S-ro R. Jaumotte tre interese parolis pri « Antikva Romo ». Li akiris varman aplaŭdon.

La 22an, la vespero antaŭ la Beneluksa Kongreso, E.K.I.-vespero estis organizata, kiu akiris grandegan sukceson : pli ol 100 ĉeestantoj ! En tre agrabla kaj amika atmosfero S-ino Ljubla Lapenna parolis pri « La vivo en Siberio » kaj poste D-ro I. Lapenna varme paroladis pri « La perspektivoj de Esperanto en la nuna monda situacio ». Longa aplaŭdo kaj spritaj dankvortoj de la E.K.I.-Prezidanto Maur. Jaumotte rekompencis la parolintojn. Multaj esperantistoj kaptis tiun okazon por interkontakti kun la du gastoj kaj la membroj de la diversaj antverpenaj grupoj.

La 23-24-25an okazis la Beneluksa Kongreso, pri kiu la detalaj raportoj aperis en speciala « Beneluksa Esperantisto ». La 29an, diversaj membroj raportis pri la Kongreso, ĉu proze ĉu poezie.

La 5an de junio, okazis la parolata ĵurnalo kaj la 12an la membroj vizitis la antverpenan kermeson.

La 13an tuta karavano da finnaj samideanoj (survojen al Parizo) vizitis nian urbon. S-ro G. Vermandere, kiel delegito de U.E.A., akceptis ilin kaj helpata de diversaj fidelaj membroj, oni vizitis nian urbon. Dimanĉvespere la esperantistoj de la diversaj grupoj

## BELGA ESPERANTO-INSTITUTO, K. S.

BILANCO JE LA 30-A DE MARTO 1953

| | | | |
|---|---|---|---|
| Magazeno ... ... | fr. 81.229,08 | Socia Kapitalo ... ... | fr. 83.000,— |
| Kaso, Poŝtĉeko PM. ... | 22.880.97 | Laŭleĝa rezervo ... ... | 4.000,— |
| | | Eksterordinara rezervo ... | 23.000,— |
| Kooperantoj-akciuloj ... | 27.161,39 | Amortizo ... ... ... ... | 6.000,— |
| | | Kreditoroj ... ... ... | 20.270,70 |
| Klientoj-ŝuldantoj ... ... | 7.948,54 | Dividendoj pagotoj ... | 84,— |
| Statutaj deponoj ... ... | 3.700,— | Statutaj deponintoj ... ... | 3.700,— |
| | | Saldo : | |
| | | Profito antaŭa fr. 1.913,94 | |
| | | Nunjara ... ... 951,34 | |
| | | | 2.865,28 |
| | Fr. 142.919,98 | | Fr. 142.919,98 |

*Kalkulo de profito kaj perdo.*

| | | | |
|---|---|---|---|
| Generalaj elspezoj ... | fr. 1.409,20 | Saldo de antaŭaj jaroj fr. | 1.913,94 |
| Gajno ... ... ... ... | 951,34 | Magazeno ... ... ... ... | 446,60 |
| | Fr. 2.360,54 | | Fr. 2.360,54 |



estis akceptataj en la finna marista hejmo kaj poste en « Witte Leeuw ». La finnoj ĥore aŭdigis belegajn, artajn kantojn. Nia Prezidanto elparolis la bonvenajn vortojn kaj la gvidanto esprimis sian profundan dankon pro la kora akcepto.

La 19an la lernantoj de la lasta kurso ricevis siajn diplomojn. En la programo, kiu kompletigis tiun solenaĵon, F-ino H. Hofkens kaj Ch. Van Gompel montris kiamaniere oni povas konduki fremdulojn tra la urbo. F-ino C. Peeters, nome de la lernintoj de la perfektiga kurso, per vortoj kaj per donaceto tre sprite dankis S-ron De Ketelaere M. F-ino Moriamé, nome de la lernantoj de la elementa kurso dankis S-ron M. Jaumotte kaj F-ino G. Van Gompel donacis belan planton al S-ino Jaumotte. Post ŝajraj paroloj de nia Prezidanto S-ro J. Verstraeten esprimis la dankemon de la membroj al ilia Prezidanto kaj S-ro J. Vinck kaj Vingerhoets W. konkludis tiun vesperon per tre amuza skeĉo.

La 26an, oni diskutis pri la antverpena trafikproblemo kaj parolata ĵurnalo estis la temo de la unua kunsido de julio. Malgraŭ la libertempo, la kunvenoj ĉiusemajnaj plene kontentigis pro la regula, nombra ĉeestado.

La 10an, S-ro Ch. Van Gompel gvidis nin tra la urbo kaj la 17an S-roj R. Balleux kaj J. Montmirail organizis amuzan vesperon kaj sukcesis dum pli ol unu horo forgesigi al la ĉeestantoj la ĉiutagajn zorgojn.

La 24an S-ro K. Ameryckx parolis pri « Centra Hejtado ». Kiel fakulo kaj metiisto, li detale informis pri la diversaj sistemoj. Li klarigis la funkciadon kaj la manierojn por varmigi la domojn. Multaj demandoj post la parolado montris la intereson de la aŭskultantoj.

La 31an per la rakontado de travivaĵoj el sia infanceo, S-ro J. Verstraeten sukcesis kapti la atenton de la ĉeestantoj dum tuta horo. Vizitis nian klubon niaj anglaj amikoj : Ges-roj Love.

La 7an de aŭgusto, okazis la parolata ĵurnalo kaj la 14an, pro la antverpena feria semajno oni kunvenis nur en intima rondo sen speciala programo. La 21an komenĉiĝis la « raportoj pri la libertempo ». S-ino L. Bernearts parolis pri sia restado ĉe la marbordo: F-ino E. Van der Weken vojaĝis al Aŭstrujo kaj donis siajn impresojn. S-ro H. Vermuyten ĝuis agrablan semajnon en Danujo kaj li tre sprite rakontis siajn travivaĵojn.

La 23an, du plenaj aŭtoĉaroj forveturis al Valkenburg, kie la verdstelanoj travivis tutan belan tagon kaj vizitis la ĉefajn vidindaĵojn de tiu fama suda nederlanda urbeto.

Merkrede la 26an, dum neoficiala kunsido, estis akceptata la indonezia samideanino S-ino Datoe Toemenggoeng, akompanata de sia amikino. Urĝe telefone alvokita de S-ro M. Jaumotte, multaj membroj ĉeestis tiun hazardan vesperon kaj denove travivis agrablajn horojn. S-ro M. Jaumotte bonvenigis la gastojn. S-ino D. Toemenggoeng parolis ankaŭ nome de sia amikino kaj donacis al la Prezidanto, al la grupo kaj al kelkaj membroj belajn orientajn objektojn. En tre agrabla atmosfero finiĝis tiu kunveno.

La 28an okazis plia raportado pri la libertempo kaj S-ino G. Debacker detale prelegis pri sia vojaĝo al Konstanz: — vojaĝo kiun ŝi faris akompanata de kvin verdstelanoj.

La 4an de septembro denove nia parolata ĵurnalo bone funkciis kaj la 11an F-ino M. Hofkens, S-ro K. Amerynckx kaj S-ro J. Verstraeten daŭrigis la rubrikon : « Libertempaj Raportoj ».

La 14an F-ino Henny De Ketelaere komencis elementan kurson antaŭ 35 lernontoj; la 18an, S-ro Vermuyten interese kaj entuziasme paroladis pri kvaropo da Poetoj, kiuj kune eldonis belan libron, el kiu li legis belajn eltiraĵojn kaj la lastan vendredon okazis antaŭ 80 ĉeestantoj bonege preparita kaj sukcesinta Kabareda Vespero, al kiu kunlaboris fraŭlinoj J. kaj M. Ameryckx, H. kaj P. De Ketelaere kaj Lea Vinck kaj S-roj W. Vingerhoets, W. Van Nereaux, J. Vinck, Ch. Van Gompel kaj F. Ameryckx. Longa aplaŭdo kaj elokventaj prezidantaj vortaj rekompencis la aktorojn.

*Programo de la venontaj Kunvenoj.*

Ĉiuvendrede en « Witte Leeuw » Frankrijklei, 4 je la 20a 30 h. (1a etaĝo).

Oktobro : la 10an (sabate) : Aŭtuna Balo: la 12an (lunde) : komenco de supera

kurso gvidota de S-ro Jaumotte; la 16an : amuza vespero organizota de F-ino H. De Ketelaere; la 18an (dimanĉe) : partopreno al la festeno de la Brusela Grupo; la 23an : mitulvespermanĝo; la 30an : teatra vespero organizota de la teatra sekcio;

*Novembro* : la 6an : parolata jurnalo : la 13an : S-ro R. Van Eynde, parolos pri « Sociaj Problemoj »; la 20an : F-ino L. De Winter montros « Manieroj por drapi la vestojn »; sekvota de kantvespero; la 27an: kabareda Vespero; la 28an (sabate) : vizito al la Pulĉinela Kelo.

*Decembro* : la 4an : parolata ĵurnalo kaj Sankta Nikolaa festo; la 11an : parolado de S-ro L. Deroisy pri geografia temo « La norda Poluso »; la 18an : Zamenhofa Vespero; la 26an (sabate) : Kristnaskfesto kaj Balo.

## BRUGO
### Bruĝa Grupo Esperantista.
*(Poŝtĉeknumero : 4835.33)*.

Dum la kunveno de la 14a de aprilo disvolviĝis debato « Por aŭ kontraŭ alkoholaĵoj ». Vigla partopreno de ĉiuj ĉeestantoj konkludigis al uzo sen misuzo. Esperanta kartludado « Leksikon » okazis la 21an. Dum la kunveno de la 28a estis donataj, escepte pro nedisponebleco de la kutima kursejo, la 19a kaj 20a lecionoj de la elementa kurso, post kiu estis rakontataj humoraĵoj.

La 5an de majo estis priparolata la temo de la oratora konkurso antaŭvide al la kongreso, post kio sekvis interparolado pri la kermesa foiro. Plia numero de la parolata gazeto aperis la 12an de majo, kun ĉefaj artikoloj de S-ro Marcel Poupeye, pri « La 150a datreveno de la naskiĝo de Profesoro Justus Liebig », de S-ro Ch. Poupeye, pri « Esperantista Mono » kaj de S-ro G. Groothaert pri « Libertempado en Waulsort ». La du lastaj lecionoj de la elementa kurso estis donataj dum la kunveno de la 19a de majo; finante tiun kurson, la gvidinto S-ro Ch. Poupeye, gratulis la persistemajn gelernintojn kaj incitis ilin al plia praktikado de la lingvo per fidela partopreno en la grupa vivo kaj en la ĝenerala movado. Lastaj aranĝoj estis prenataj por la irado al la Beneluksa Kongreso, al kiu ĉeestis 15 gemembroj. Dum la sekvanta kunveno de la 26a, la kongresintoj detale kaj entuziasme raportis pri la kongresaj okazintaĵoj. Dimanĉe 30an de majo, la grupa flago estis portata en la sekvantaro okaze de la ĝoja eniro de la Reĝo en Bruĝo kaj la 2an de junio, la ĉeestantoj interŝanĝis lastajn eĥojn pri la kongreso kaj poste lernige kartludis.

La 9an de junio, aperis denove la parolata gazeto kun kontribuaĵoj de F-ino Yvonne Poupeye pri « Kokao », F-ino Is. Van Parys pri « Eŭropa Kolegio en Bruĝo », kaj de S-ro Ch. Poupeye, kiu prezentis krucvortenigmon komune solvotan dum la kunveno. Debato pri la preferitaj libertempoj okazis la 30an de junio. La 5an de julio, kelkaj grupanoj faris komunan ekskurson al Wenduine, kie ili promenadis, ludis kaj... rostiĝis en la belaj dunoj.

Dum la kunveno de la 7a de julio, S-ro Groothaert prezentis kaj komentariis kelkajn elektitajn diskojn ludatajn pere de la bonega diskaŭdigilo antaŭ nelonge akirita de la grupo. S-ro Van Gompel el «La Verda Stelo» de Antverpeno vizitis la kunvenon de la 14a de julio, dum kiu estis eldonata denove la parolata gazeto, kun artikoloj de F-ino Is. Van Parys, pri « Johannes Brahms », de S-ro Marcel Poupeye pri « Ultraviolaj radioj » kaj de S-ro J. Vermeersch pri « La mensaj aktivecoj de la homo ».

Alia delegacio de la « Verda Stelo », nome S-ino Bernaerts kaj F-ino Toussaint, ĉeestis la kunsidon de la 28an de julio, dum kiu S-ro J. Vermeersch antaŭlegis sian tradukon de parto el la libro de D-ro Carrel « La Homo, tiu nekonatulo », nome pri « La adaptaj funkcioj ».

Debato « Por aŭ kontraŭ ĉapeloj » okazis la 4an de aŭgusto; F-ino P. De Staercke faris la plej interesan komunikaĵon pri tiu temo. Denove, la 11an de aŭgusto aperis la parolata gazeto kun artikoloj de F-ino Is. Van Parys, pri « La deveno de la alumedoj »; de F-ino P. De Staercke, pri « Caruso, la favorato »; de S-ro Marcel Poupeye, pri « La unua fluganta besto » kaj de S-ro Ch. Poupeye, pri « Kelkaj pensoj pri la homa cerbo ».



Plia vizitanto, S-ro J. U. Hommes, instruisto kaj Del. U.E.A. el Appeldoorn (Ned.) estis akceptata la 18an de aŭgusto. S-ro F. Lenoir, ekslerninto el la antaŭlasta kurso, legis rakonton de li bonege tradukitan « Ombro de dubo ». Post la naŭa la ĉeestantoj kune promenis laŭ la vojo de la lumigadoj. Eksterordinara kunveno okazis la sekvantan tagon pro la vizito de kvin italaj gesamideanoj gvidataj de S-ro Luigi Topi, Del. U.E.A. el Cremona, kaj denove la belegaj lumigadoj estis kune admirataj.

La serio de vizitantoj estis daŭrigata la 25an de aŭgusto de S-ino Ivy Myers el Poole kaj F-ino Sybil Lock el Bristol (Anglujo).

La 1an de septembro okazis nova aŭdigo de du artaj longludaj diskoj prezentataj kaj komentariataj de S-ro G. Groothaert kaj la 8an de septembro D-ro Theodor Henneberg, okulisto el Kamen apud Dortmund (Germ.) fermis provizore la vicon de la ekstergrupaj vizitantoj. Li klarigis per tre bona lingvo, ke li lernis Esperanton tutsole de nur kvin monatoj kaj por la unua fojo interparolis kun samideanoj okaze de sia nuna vojaĝo. Post tio, en la kadro de la parolata gazeto, parolis : S-ino J. Groothaert, pri « Ĉampanvino »; S-ro G. Groothaert, pri « Nevill Duke, rekordulo pri rapideco », kaj S-ro Ch. Poupeye, pri « Ne-esperantistaj pensoj ».

*Programo de la venontaj kunsidoj* :

Ordinara kunveno : *principe* ĉiumarde je la 20a, en la sidejo « Gouden Hoorn - Cornet d'Or », Simon Stevinplaats, 2. La kunvenoj de la 23a kaj 30a de septembro okazis merkrede, pro nedisponebleco de la kunvenejo. Dum la daŭro de la elementa kurso, (23-9 ĝis 29-12) la unua horo de ĉiu kunveno estos dediĉata al leciono. La ĉi suba programo rilatas do nur al la dua horo de ĉiu kunveno :

*Oktobro* : 13an : Parolata gazeto. — 17an : je la 21a en « Tabarin » Unua Balo de tiu ĉi vintra sezono, kun la bonega orkestro. « The Moonliners ». Antaŭmendu viajn kartojn. — 20an : Parolado de F-inoj Is. kaj Y. Van Parys kaj Y. Poupeye : « Vojaĝo al Karintio kaj Venicio ». — 27an : Portretludado.

*Novembro* : 3an : Kartludado. — 10an : Humoraĵoj. — 17an : Kanta vespero. — 24an : Parolata gazeto.

*Decembro* : 1an : Muzika vespero. — 8an : Surpriza vespero : ĉiu alportu nekonatan donaceton. — 15an : Zamenhofa festo. — 22an : Legado de teatraĵeto. — 29an : Humoraĵoj.

## BRUSELO
### Esperantista Brusela Grupo.
*(Poŝtĉeknumero : 12.30.48)*

Malgraŭ la bela somervetero niaj kunvenoj estis ĉiam multnombre vizitataj. Ni havis ankaŭ la plezuron bonvenigi ĉe ni du eksterlandaninojn, nome S-inon Morris, Sussex (Anglujo) kaj S-inon Schafert Ĝenevo (Svislando).

La 20-an de julio ni kunvenis pro la tre bela vetero en libera aero. Ni pasigis tre agrablan kuneston en restoracio ĉe la arbaro « Bois de la Cambre ». La 27-an F-ino Kestens gvidis nin tra malnovaj Bruselaj kvartaloj, kaj atentigis nin denove pri historiaj domoj kaj monumentoj.

La 5-an de aŭgusto kaj la 7-an de septembro okazis la parolata ĵurnalo. La plej altan poentnombron akiris S-ino Ernst respektive S-ro Van der Stempel. Ĝi estis la lasta antaŭ la premio-disdonado. La 10-an de aŭgusto ni havis la plezuron aŭskulti S-inon Elly Staes, kiu faris tre bonan prelegon pri « Ŝi, la tria ». La 17an estis la vico de S-ro Van der Stempel, kiu prelegis en tre interesa kaj fakscia maniero pri la historio de la kinematografio. La 24-an S-ino Plyson gvidis la vesperon; ŝi aranĝis en tre lerta maniero gramatikan vesperon, al kiu ĉiuj entuziasme partoprenis. La 31-a estis rezervata al novbakita Esperantistino, S-ino Heyman, kiu faris sian unuan prelegon en esperanto. Ŝi rakontis pri sia vojaĝo al Svedujo tra Norvegujo kaj rikoltis multe da sukceso.

Sabaton, la 29-an de aŭgusto 1953 bruselaj esperantistoj vizitis la Reĝan Observatorion en Uccle, laŭ invito de S-ro E. Vandekerkhove, astronomo. Li montris al la vizitantoj la horloĝojn, kiuj donas al ĉiuj ŝtatservoj la ĝustan horon; poste li gvidis ilin en diversajn observejojn, kie li ĉion bone klarigis, per

simplaj vortoj, kompreneblaj por ĉiuj. Fine, li agrable surprizis nin, montrante al ni ekzempleron de scienca verko eldonita en nacia lingvo *kaj esperanto*. Ĝi estas *fotometria atlaso de la sunospektro*, verkita de S-ro Minaert kaj eldonita en Utrecht, 1940. La ĉeestintoj konservos tre bonan memoron pri tiu ege interesa vizito kaj pri sia simpatia gvidanto, S-ro E. Vandekerkhove, kiun ili tie ĉi ankoraŭfoje dankas.

*Programoj de la estontaj kunsidoj.*

*Oktobro* : la 12an : S-ino Stern parolos pri « Tri muzikistoj, tri epokoj (disaŭdigo de diskoj); dimanĉon la 18an : Jara Festeno je la 14a en « Moulin d'Or » 38, rue des Pierres, por festi S-ron H. Castel; (enskriboj 125 fr. pagotaj sur poŝtĉekkonto 1250.48 de Bruselа Grupo Esperantista); la 19an : Perfektiga kurso gvidata de S-ro Van der Stempel; la 26an : S-ino Lefebvre respondos al demandoj pri Jugoslavujo.

*Novembro* : La 2an : Parolata jurnalo; la 9an : S-ro Van Geit « Pri insektoj », dua parto; la 16an : S-ro Van der Stempel : perfektiga kurso; la 23an : F-ino Obozinski : pri « Vojaĝo »; la 30an : S-ro H. Castel Komentarioj pri la libro « Sango kaj Sablo » de Blasco Ibanez.

*Decembro* : Dimanĉon la 6an, je la 15a en la ordinara ejo Sankta Nikolaa Festo. Ni atentigas la gepatrojn ke Sankta Nikolao venos en granda ornato. Ni esperas revidi multe da infanoj, al kiuj donacoj kaj dolĉaĵoj estos donataj. La Marionetoj kun nova programo certe ne mankos al la festo. La 7an : parolata ĵurnalo; la 14an : Zamenhofa vespero en nia kunvenejo; La 12an : S-ro Van der Stempel : perfektiga kurso; la 28an Kristnaskfesto en la kunvenejo. Pro la granda sukceso de la pasintjara kristnaskfesto, ni intencas denove ornami arbon kaj disdoni donacojn.

Karaj geamikoj, bonvolu noti jam ekde nun la datojn : *18an de Oktobro* (dimanĉe), la *6an de Decembro* (dimanĉe), la *14an de Decembro* kaj la *28an de Decembro*.

*Gratuloj* : Al S-ino Couvreur, membrino de nia grupo, gratulojn okaze de la edziĝo de ŝia filo.

# NE-ESPERANTISTAJ PENSOJ

UNUA PENSO : « La apostolado de Erasmo konsistas esence je reduktado de la kontraŭecoj, kiuj estas nur ŝajnaj kaj je valorigo de la similecoj favoraj al unuiĝo de tio kio ŝajnas neakordiĝebla.

« Lia volo : multobligi la rimedojn por interkompreno inter la kleruloj dezirantaj ne perfidi la aferon de la spiritoj, estas tia, ke li forĝas je ilia intenco internacian lingvon, flekseblan, rapidan, mirinde modernan, kiu havas preskaŭ nenion plu komunan kun la klasika latino. »

El « Humanismo kaj Turismo » de Daniel Van Damme, (*Le Soir*, Bruselo 3-9-53).

DUA PENSO : « Nur Eŭropa federacio povas ebligi al niaj patrujoj retrovi realan sendependecon rilate al la aliaj kontinentoj. En la kadro de tiu nova Eŭropo, ili povos fine denove daŭrigi la normalan iradon de siaj destinoj, refariĝi fortoj de progreso, de kultura disradiado. »

El « Eŭropo antaŭ sia destino » de Et. de la Vallée Poussin artikolo pri la libro « Fortune de l'Europe » de Guy des Carmoy, (*Le Soir*, Bruselo 3-9-53).

*KAJ ESPERANTISTA PENSO*

Ĉu la Eŭropa federacio de la 20a jarcento ne nepre bezonos la internacian lingvon de Erasmo (16a jarcento) ...en ĝia ankoraŭ pli moderna formo : ESPERANTO ?

---

**POR LA ANTVERPENANOJ**

**La Grupo « La Verda Stelo » intencas presigi en nia organo anoncon, en kiu ĝi rekomendos siajn membrojn, komercistojn aŭ profesiulojn kiujn ajn, kiuj rilatas kun klientaro.**

**Tio estos por la membroj senpaga reklamo.**

**Ĉiu rajtas je unu-linia teksto, kiun li do havigu TUJ !**

---

— Biro-krajonoj « ESPERANTO » estas vendataj de L. M. COPERNICI, Via Bruino 5, Torino (Italujo).


LES ENTREPRISES
**DERKS**
226, Rogierstrato, BRUSELO
Tel. : 15.19.92
Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

Por viaj esperantajoj, libroj, insignoj k. c.
**Belga Esperanto-Instituto**
26, Oostenstraat, 26
ANTVERPENO
*kiu ankaŭ havigos al vi nacilingvajn librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj ĉiuspecan skribmaterialon.*

BRUGGE BRUGES
**Hôtel du Cornet d'Or**
2, Simon Stevinplaats, 2
Centra situo - Moderaj prezoj
—— Moderna komforto ——
Sidejo de « Bruĝa Grupo Esperantista »
—— Tel. 314.59 ——

**G. FAES**
16, Schoenmarkt, 16
ANTVERPENO
—— Por via MUZIKO,
RADIO kaj GRAMOFONO

**BELGA ESPERANTO-INSTITUTO, koopera societo.**
26, Oostenstraat, Antverpeno.

**Rekomendas al vi :**

**D-ro IVO LAPENNA :**

**Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo :**

Fundamentaj nocioj; lukto por la paco per juraj rimedoj; internaciaj organizajoj. — Prezo : 70 fr.

Ankaŭ ĉiujn aliajn Esperanto-eldonajojn oni povas mendi ĉe **Belga Esperanto-Instituto, 26, Oostenstraat, Antverpeno.**

Belga Esperanto-Instituto akceptas abonojn al eksterlandaj Esperanto-gazetoj.

**Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°**
LA LOUVIERE S.P.R.L. Tel. n-roj 223.01 - 225.37
*Du esperantaj markoj :*
TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

VOJAĜAGENTEJO **ULTRA MONTES**
24, Koningin Astridplein, Antverpeno. — Tel. 32.76.15
17, rue d'Arenberg, Bruselo. — Tel. 12.55.02
ĈIUSPECAJ VOJAĜOJ AL ĈIUJ LOKOJ
— Vojaĝkartoj kaj rezervoj por Fervojoj, Aviadiloj kaj Ŝipoj. —

# REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

ASOCIO SEN PROFITA CELO

*Prezidanto* : D-ro P. Kempeneers 106, rue General Lotz, Uccle-Bruselo.
*Vic-Prezidanto* : S-ro M. JAUMOTTE, 44, avenuo De Bruyn, Wilrijk-Antverpeno.
*Ĝenerala Sekretario* : S-ro H. SIELENS, Houwerstraat, 12, Antverpeno.
*Sekretario* : S-ro Joseph SOYEUR, 91, rue du Chêne, Seraing.
*Kasistino* : S-ino J. PLYSON, 185, rue Jourdan, Saint-Gilles-Bruselo.

## KOMBINATAJ KOTIZOJ

## Rega Belga Ligo Esperantista kaj Universala Esperanto-Asocio

| | A. | B. | C. |
|---|---|---|---|
| I. *Simpla membreco* (enhavas membrecon al la loka Grupo — se ekzistas — al la Ligo kaj al la internacia organizaĵo: rajtigas ricevi la nacian gazeton « Belga Esperantisto » kaj la internacian kuponaron por servoj) ... ... ... ... ... | **25,—** | **50,—** | **100,—** |
| *Familia membro* (same, escepte la gazeton) ... ... ... ... | | | **50,—** |
| II. *Membreco kun individua* aliĝo al la internacia organizaĵo · | | | |
| a) *Membro kun Jarlibro* : kiel simpla membro; ricevos krome la Jarlibron kaj ĝian aldonon ... ... ... ... ... ... ... | **75,—** | **100,—** | **150,—** |
| b) *Membro Abonanto* : kiel membro kun Jarlibro; ricevas krome la monatan internacian gazeton « Esperanto » ... | **165,—** | **190,—** | **240,—** |
| c) *Membro Subtenanto* : kiel membro abonanto; pagas pli altan kotizon por helpi la movadon ... ... ... ... ... | **250,—** | **275,—** | **350,—** |

III. *Bonfaranta Membro* memvole aldonas almenaŭ 25 fr. al sia kotizo, speciale por helpi al R. B. L. E.

Pagu al via loka grupo; se ne ekzistas, al poŝtĉekkonto 1337.67 de Reĝa Belga Ligo Esperantista.

A. Kadetoj (ĝis 18 j.); B. Junuloj (ĝis 21 j.); C. (21 j. kaj pli).

## BELGA ESPERANTO-INSTITUTO

Koopera Societo

*D-ro L. L. Zamenhof, 1859-1917. Aŭtoro de Esperanto.* — Reproduktaĵo sur poŝtkarto, de la bildo de nia Majstro pentrita kaj donacita al Internacia Esperanto-Muzeo, Wien, de artpentristo Ach. Bentos. Eldono « Esperanto », Oostenstr. 26, Antwerpen. Prezo : Fr. 2.—. La sama bildo estas havebla kiel vera fotografaĵo. Prezo : poŝtkartformato : Fr. 10.—; 24 x 30 cm., Fr. 65.—; 30 x 40 cm., Fr. 100.

Imp. Lielens, s. p. r. l., 18, rue de la Princesse, Bruxelles — Tél. : 21.10.98 — 21.87.90